

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

januaro/februaro/marto 1988



40a IFEF-Kongreso en Perpignan

4a ĝis 11a de junio 1988



Kongresejo estas la „Palaco de la kongresoj“, kiu enhavas i. a. aŭditorion kun 1200 sidlokoj, 13 kunvenĉambrojn, halon por ekspozicio kaj memservan trinkejon/manĝejon.

Fotoj: J. Paul et Andrée Legard

Jubilea kongreso en Francio

Lastjare la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) kongresis en Katowice (Pollando). En 1988 estos la francaj gekolegoj, kiuj de la 4a ĝis la 11a de junio akceptos la kongresanojn en Perpignan, la sudfranca, sunoriĉa urbo inter maro kaj montaro. Estos la 40a postmilita, kaj pro tio jubilea IFEF-kongreso.

Perpignan situas proksime de la Mediteranea marbordo, ĉirkaŭ 40 km norde de la franca-hispana landlimo. Ĉiuj trajnoj survoje al la hispana limstacio Port-Bou veturas tra tiu grava fervoja nodo. La FR Germanio estas ligata kun Perpignan ankaŭ per rekta kuŝvagonaro, kio faciligas la decidon nepre vojaĝi tien.

La kongresurbo povas retrorigardi al dumiljara historio. Kiel en multaj okcidenteŭropaj landoj la romianoj post-lasis siajn spurojn en la fekunda, sunoriĉa regiono dum sia plurcentjara



Centro de Perpignan

okupado. En la 11a jarcento Perpignan fariĝis posedaĵo de la grafoj de Rusiljono, kiujn sekvis la reĝoj de Aragon. Inter 1276 kaj 1344 ĝi estis ĉefurbo de la reĝlando de Majorko. Fine de la 15a jarcento tie regis la francoj, poste la hispanoj. Depost 1659, laŭ la Traktato de la Pirineoj, Perpignan apartenas definitive al la franca teritorio.

Kio distingas Perpignan, estas ĝia sudeca karaktero; tiu ĉi donas al ĝi la aspekton de plezura urbo, kie la restado estas

agrabla kaj vivoplena. La centro entenas belajn placojn kaj avenuojn ombritajn de platanoj, mimozoj kaj palmarboj.

Kvankam en la 19a jarcento la rempar-zonoj estas malkonstruitaj por pligrandigi la urbon, ekzistas ankoraŭ rimarkindaj monumentoj, ekzemple la ĉarma kasteleto, iam urbopordego, poste malliberejo, nun muzeo pri rusiljonaj artoj kaj popoltradicioj. La fasado de la urbodomo el riverŝtonoj, kun larĝaj pordoj el forĝita fero, montras lokotipan arkitekturon de Rusiljono. En la honor-korto altiras la atenton bronzmuldita virina figuro de la fama skulptisto Maillol. Bona ekzemplo de civila konstruarto en la mezepoka Rusiljono estas ankaŭ la palaco de la deputitaro. La marhalo, iam la komerca borso kaj sidejo de la markonsulejo, montras ĉiujn kutimajn karakterojn de la gotika flamstilo. Vizitinda krome estas la katedralo de la Sankta Johano, konstruita en la 14a/15a jarcento en gotika stilo. Enirante en la unusolan kaj larĝan navon la rigardanto admiras la harmoniajn proporciojn. La portalo de la relative nuda fasado konstruiĝis en la 17a jarcento.

Perpignan estas cetere grava komerca centro por agrikulturaj produktoj; sed ĝi disponas same pri industria kaj ekonomiaj zonoj kaj nelaste pri sufiĉe da bonkvalitaj hoteloj, ankaŭ en la proksimeco de la kongresejo. Aparte oni fieras pri la palaco de kongresoj, bonege ekipita kaj moderna konstruaĵo, kiun LKK de la 40a IFEF-kongreso elektis por niaj aranĝoj. La aŭditorio ofertas ĝis 1 200 sidlokojn. Kunhelpu per via partopreno, ke almenaŭ la duono de la sidlokoj estos okupata. Por la diversaj kunsidoj estas disponeblaj sufiĉe da salonoj. En memserva restoracio tie oni povas tagmanĝi. Plie, en la iama kapelo de la Sankta Dominiko, ĝis 1 000 kongresanoj povas bankedi, danci kaj interfratiĝi. Buslinioj trairas la urbon, i. a. de la stacidomo al la kongresejo. Vi vizitos la

vidindaĵojn dum komuna aŭ individua rondirado kaj certe eluzos ankaŭ la ofertotajn du duontagajn kaj unu tut-tagan ekskursojn por konatiĝi kun la ĉirkaŭa plaĉa regiono. Pri tiuj turismaj programeroj legu la sekvan germanlingvan artikolon.

Ĉio, precipe la nuntempaj informoj montras, ke la 40a IFEF-kongreso estas

modele preparata de niaj francaj ge-kolegoj. Perpignan sendube estas urbo digna al la jubilea aranĝo. Nia landa asocio GEFA nepre devos esti tie reprezentata de multnombraj kongresanoj. Bonvolu baldaŭ decidi pri via partopreno kaj peti aliĝilon ĉe via komisiito en la direkcia distriko. Ĝis revido en junio!

W. B.

Jubiläumskongreß 1988 in Perpignan

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) lädt herzlich ihre Mitglieder und Freunde zur Teilnahme am 40. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) ein. Die Jubiläumveranstaltung findet vom 4. bis 11. Juni 1988 in der südfranzösischen Stadt Perpignan, nahe der spanischen Grenze, statt.

Der moderne Kongreßpalast bietet den Teilnehmern alle technischen Voraussetzungen für einen guten Ablauf der Veranstaltungen, sei es die Eröffnung, die Arbeitssitzungen oder der Folkloreabend. Auch ein touristisches Programm ist vorgesehen.

Von den beiden Halbtagsausflügen führt eine Fahrt in die Landschaft Conflent mit Besuch der romanischen Klosteranlage in St.-Michel-de-Cuxa sowie der mittelalterlichen Stadt Villefranche. Beim zweiten Halbtagsausflug fahren die Omnibusse entlang der sogenannten Goldsilber-Küste, die nach 40 km in die spanische Costa Brava übergeht. Besucht wird der romantische Hafenort Collioures mit seinem oft gemalten Glockenturm und einem alten Schloß. Vorbei am Handelshafen Port-Vendres, der zur Römerzeit Porto Venaris hieß, geht die Weiterfahrt zum bekannten Weinort Banyuls-sur-Mer, wo auch der berühmte Aperitif gleichen Namens erzeugt wird.

Wer gutes Essen und süffigen Wein schätzt, wird sich den ganztägigen Ausflug nach Gaussan nicht entgehen lassen. In der Nähe von Tautavel werden prähistorische Orte besucht, wo Jäger Höhlen bewohnten und wo die Reste des ältesten Menschen in Europa (450 000 Jahre) im Museum zu besichtigen sind. Anschließend fahren die Omnibusse zum



Collioures — Celo de unu ekskurso

Kloster Fontfroide in der Nähe von Narbonne.

Bleibt noch zu erwähnen, daß die Übernachtungspreise (ohne Frühstück) in den Hotels, die höchstens 15 Minuten vom Kongreßgebäude entfernt liegen, beispielsweise für ein Einzelzimmer zwischen DM 27,— und DM 63,— liegen. Weitere Einzelheiten und das vorläufige Kongreßprogramm enthält der Anmeldevordruck, der vom zuständigen Bezirksbeauftragten zu beziehen ist. Bis zum 1. Februar gilt für IFEF-Mitglieder der verbilligte Kongreßbeitrag von DM 45,—; anschließend erhöht er sich auf DM 66,—. Beachten Sie bitte die offiziellen Umrechnungskurse zum Zeitpunkt Ihrer Überweisung.

Für maximal 60 Reiselustige wird noch etwas Besonderes angeboten: Eine Viertagereise für etwa DM 210,— nach Andorra, von Karl dem Großen bereits im 8. Jahrhundert gegründet. Das 452 qkm große Gebiet in den Pyrenäen ist seit 1810 neutrale Republik und gehört gemeinsam dem Bischof von Urgel und dem französischen Staatspräsidenten.

Die Einwohnerzahl beträgt jetzt 45 000 (1951: 5 400). Man zahlt keine Steuern und verkauft zollfreie Waren an die Touristen. Für die drei Hotelübernachtungen stehen nur Zwei- und Dreibettzimmer zur Verfügung. Anmeldung mit besonderem Vordruck.

Wir wünschen schon jetzt allen Kongreßteilnehmern einen angenehmen Aufenthalt in Südfrankreich im Juni 1988.

W. B.

La Francaj Fervojoj

Por atingi Perpignan, la urbon, kie okazos la IFEF-kongreso 1988, la plej multaj kongresanoj uzos la Francajn Fervojojn (SNCF). Ili spertos mem la avantaĝojn de unu el la plej modernaj trafikentreprenoj en Eŭropo. Ĝia dungitaro, dum la lastaj jaroj rigore kiel ĉe la DB reduktita, konsistas nuntempe el proksimume 220 000 fervojistoj. La trafikministro devigis la SNCF ŝpari ĝis 1989 po jaro unu miliardon da frankoj por plibonigi la ekonomian rezulton.

La SNCF troviĝas rilate la vartrafikon en simile malfacila situacio kiel la DB. Ĝis 1986 la kvanto de la transportitaj tunoj estis regresinta al 160 000 tunoj, do 8 % malpli kompare al 1985. La enspezoj estis 13,9 miliardoj da frankoj. Kaŭzoj por tiu negativa evoluo estis strukturproblemoj de la franca industrio samkiel la perdo de transportkvotoj favore al la konkurenco; la ĉi lasta profitis de la malalta dolarkurzo kaj sekve de tiu pro reduktitaj benzinoprezoj.

Tamen la plej grandan deficiton kaŭzis la regresanta transporto de ercoj, ŝtalo, greno, sterko. Kreskis kontraŭe la nombro de transportitaj aŭtomobiloj kaj kamionoj. La SNCF klopodis plibonigi sian pozicion sur la transportmerkato ofertante novajn servojn, ekzemple per transportoj al kaj de stacioj aŭ en la vartrafiko kun la DB per rektaj vartarifoj.

En la pasaĝertrafiko oni nombris en 1986 775 milionojn da vojaĝantoj. Regresis la

trafiko de ekspresaj kaj akcelaj trajnoj, kreskis la najbara trafiko. La enspezoj estis 18,5 miliardoj da frankoj. Bonege evoluis la pasaĝertrafiko per rapidegaj trajnoj (TGV), kiuj interligas Parizon kun Sudfranco. Per la TGV-trajnoj ĉiutage estas transportataj meznombre 47 000 pasaĝeroj. Por la forta konkurenco de aviadiloj kaj aŭtomobiloj oni enkondukis specialajn tarifojn kaj modifitajn distancojn.

Al tiu promesplena trafiko servas ankaŭ la nuntempaj investoj. Sur novaj trakoj al sudokcidento kaj precipe al la atlantiko veturos ekde 1989 TVG-vagonaroj de la t. n. dua generacio, kies rapideco estos 300 km/h. Ekologie interesas, ke oni instalas apartajn pasejojn sub kaj super la trakoj, por ke la ĉasbestoj trapasu laŭeble sur kutimaj vojoj siajn kampojn ambaŭflanke de la trakoj. La amfibioj estas transportataj antaŭ la nasko de iliaj idoj al nove konstruitaj lagetoj (biotopoj).

Post ratifiko de la kontrakto inter Britio kaj Francio komenciĝos definitive la konstrulaboroj por la submara tunelo, teknike nenia problemo. Krome la registaroj de Francio, Belgio kaj FR Germanio devos decidi, ĉu kaj kiam la projektitaj trakoj Parizo - Bruselo - Kolonjo por la TGV-trafiko povos esti konstruataj. Do ne mankas ideoj por adapti la naciarn kaj internacian trafikon al la postuloj de la venontaj jaroj. Espereble la politikistoj subtenos la projektojn morale kaj precipe finance.

W. B.

Wichtig!

Alle Mitglieder und Freunde, die eine Reise in die DDR planen, sollten sich frühzeitig vor dem Reiseterrmin mit dem GEFA-Sekretär in Verbindung setzen. Sie erhalten dort nützliche Hinweise. Anschrift: Hans-Jürgen Riehn, Richard-Dehmel-Straße 3, 6700 Ludwigshafen (Rhein), Telefon (0621) 58 24 43.

La 15an de decembro 1987, ĝuste je la naskiĝ-datreveno de d-ro Zamenhof, forpasis en Kopenhago prof.. d-ro **Ivo Lapenna** neforpensebla el la historio de la Esperanto-movado. IFEF partoprenis en la funebra ceremonio. La IFEF-redaktoro metis florkronon.

Kiel ni lastmomente eksciis, forpasis la 11an de januaro 1988 nia multara amiko **Otto Walder**, honora membro de IFEF, en Romanshorn post mallonga malsano. Nekrelogo sekvos en Internacia Fervojisto.

Seminario por kursgvidantoj

La 14an ĝis 18an de novembro GEFA kun valora subteno de BSW aranĝis seminarion por kursgvidantoj en „Seeheim Alt-Rantum“ sur insulo Sylt. Partoprenis 14 personoj, preskaŭ ekskluzive membroj de GEFA. Instruis la internacie renoma instruistino Audrey Childs-Mee el Nederlando.

En la subtegmentejo de la domo estis je dispono agrable granda salono. Studmaterialo ĉefe estis la lerno- kaj studlibroj „Saluton“ (Childs-Mee), „La tuta Esperanto“ (Seppik) kaj „Gramatika Ekzercaro“ (Bielinski). Kompreneble aliaj necesaj helpiloj kiel Plena Vortaro kaj Plena Ilustrita Vortaro, Plena Analiza Gramatiko kaj kursoj de aliaj verkintoj estis je dispono.

Ĉefa celo estis, peri metodojn instrui sen uzo de nacia lingvo al komencantoj kaj progresintoj, ekz. teknikeroj de prezento, memoniko, principoj kaj metodikaj paŝoj de rektmetoda instruado. En multaj viglaj diskutoj ni traktis kromajn temojn kiel rolon de la kursgvidanto, rolon de teatraĵetoj, influojn de gepatra lingvo, bezonon de tradukkapablo ĉe progresantoj, la problemon de la eternaj komencantoj ktp.

En sia finraporto la seminario-gvidantino substrekis la evidentan „seriozecon de la seminarianoj rilate al la studado, aplikado kaj instruado de la Internacia Lingvo“. Cetero tiu seriozezo ne ekskluzivis oftajn ŝercajn sonojn en la lecionoj kaj same en la postinstruaj horoj vespere. Ilin ni utiligis por instruaj prelegetoj, diversspecaj diskutoj kaj simpla senceremonia kunestado. La lastan gajan vesperon la gvidantino disdonis atestejojn pri la partopreno en la seminario.

Entute: kontentiga aranĝo. Sinceran dankon al BSW-ĉefestraro pro la instiga helpo. Giessner

Internationales Eisenbahnerrecht in Esperanto

Nach der 1985 in Jugoslawien erschienen Übersetzung des Übereinkommens über den internationalen Eisenbahnverkehr (COTIF) liegen jetzt auch die

„Einheitlichen Rechtsvorschriften für den Vertrag über die internationale Eisenbahnbeförderung von Personen und Gepäck“ (CIV) in Esperanto vor. Das belegt erneut, daß man mit Esperanto selbst komplizierteste Rechtsvorschriften formulieren kann.

Das Internationale Eisenbahn-Transportkomtee (CIT) in Bern hat dem Übersetzer, unserem Mitglied Wilhelm Barnickel (BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt), zu dieser ausgezeichneten Leistung gratuliert und wird diese Publikation den zuständigen Stellen zuleiten.

Belaj donacoj por viaj geamikoj

La lastaj infanoj de Oldrovalo de Gudrun Pausewang, 80 paĝoj, tradukis J. Giessner, ekscita libro, pasia voko kontraŭ la nuklea minaco. Prezo 13,90 DM. Mendu ĉe Esperanto-Centro 4780 Paderborn, Postfach 1450.

La Fratoj Leonkoro de Astrid Lindgren, 128 paĝoj, ilustrita. el la sveda tradukis K. Rohdin, lingve reviziita de J. Giessner, priskribas la lukton de l,bono kontraŭ la malbono, tre taŭga por grupoj. Prezo 19,80 DM, je mendo de minimume 3 ekz. samtempe al sama adreso 16,30 DM. Bv. aldoni 10% por afr/pak., minimume 2 DM. Mendu ĉe Joachim Giessner, An der Nicolaischule 3, 3420 Herzberg am Harz. Bv. antaŭpagi al poŝtĉirokonto 531 16-307 Hannover.

München

Invitinte la Esperanto-klubon München por tuttaga migrado, estis ĝojiga surprizo por mi, ke la 19an de septembro alvenis multe da geamikoj en la stacidomo Garmisch-Partenkirchen. Jes, estis preskaŭ procesio, kiu suprenmarŝis al la restoracio St. Martin sur la monto Kramer. Tridek personoj ni estis, kompreneble ankaŭ GEFA-membroj. En alteco de 1100 metroj ni tagmanĝis, antaŭ ni la impona kuliso de la Wetterstein-montaro kun la plej alta monto de Germanio, la Zugspitze. Poste ni iris ĝis la ruino de la iama kastelo Werdenfels. La estro de la tiea restoracio, pli bone kabanano, ankaŭ tre ĝojis pri la ne plu atendita granda nombro de

soifantaj gastoj. La grupo estis eĉ internacia, ĉar krom nia ĉiam aktiva hispanino Amelia kunmarŝis du s-anoj el Irano. Kaj la gastoj, kiuj partoprenis, povis konstati, ke esperantistoj ne nur estas bonaj migrantoj, sed ankaŭ mondspertaj kaj gajaj homoj.

Alfred Gissibl

Esperanto-Fernkurs n e u

Esperanto ist eine internationale Sprache. Die Grammatik ist einfach und logisch; sie besteht nur aus wenigen kurzen Regeln. Es gibt keine Ausnahmen und Unregelmäßigkeiten.

Esperanto wurde für die internationale Kommunikation geschaffen.

Der neu aufgelegte Esperanto-Sprachkurs mit Lehrbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung ermöglicht es, daß jeder zu Hause Esperanto lernen kann. Zeitpunkt des Beginns, tägliche Dauer, Umfang, Lerntempo kann jeder selbst bestimmen. Experten beraten schriftlich, individuell und nach jedem Lernschritt.

Kurskosten: 30,— DM

Bestellung: Einzahlung auf das Postgirokonto 61 150—466 beim Postgiroamt Dortmund.

Empfänger: Joachim Schropp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.)

EDS-Anschrift:

BSchule 440 Münster (Westf.).

Aus den Gruppen

Bremen

La Zamenhoffesto 1987 okazis la 9an de decembro.

Merkredon la 13an de januaro oni diskutis pri la temo „Trafikproblemoj“ sub gvido de Dieter Hartig.

Dortmund

Zum traditionellen „Zamenhof-Fest“ mit Jahresausklang am 19. 12. 87 wurde ein Lichtbildervortrag mit dem Thema: Sri Lanka - malnova lando kaj nova kampo por esperantistoj“ angeboten.

Fervojistoj en la 750-jara TELGTE

Ne nur la organizantoj, sed ankaŭ granda parto de la partoprenintoj el kvin landoj estis IFEF-membroj, kiuj venis por festi la „Renkonton en Telgte“, kiel raportis la lokaj ĵurnaloj, alludante pri la samtitola romano Günter Grass.

Duan fojon en la regiono de Münster sin prezentis la Vestfalia Aŭtuno kiel kultura kaj turisma kromprogramo por esperantistaj laborkunsidoj. Jam antaŭ du jaroj en la vestfalia ĉefurbo Münster pli ol 100 junulara renkonto, refondade de landa ligo REVELO, jarĉefkunveno de Bona Espero, teatrovespero, kanzonado de Gian Franco kaj Guido (BAF), ekskurso al vivostacioj de Annette von Droste Hülshoff, vizitoj al planetario, muzeo-vilaĝo k.a.

Nunjare de la 20a ĝis la 22a de novembro la 750-jara urbeto Telgte gastigis 51 geamikojn de la societo Bona Espero. La kadroprogramo Vestfalia Aŭtuno ofertis ekskursojn tra regionaj historiaj kaj metiarto, migreton en la ĉirkaŭa naturo, fakan gvidadon tra atentinda kripo-ekspozicio en la loka muzeo kaj samtie edifan vesperon apud kamenfajro. Prelegis d-ro Fischer pri konkludoj el la jubilea jaro; kanzonojn adekvatajn prezentis Guido, vestfalian regalon la gastigantoj kaj adiaŭan kanton la gastoj mem.

La voĉdonrajtaj membroj de Bona Espero elektis sian estraron, i.a. kiel prezidantinon Margret Brandenburg kaj kiel kasistinon Ursula Schropp. Elfriede Kruse kaj aliaj kunlaborintoj de la brazila infanvilaĝo Bona Espero vidigis diapozitivajn kaj raportis pri siaj spertoj kaj pri la progesa evoluo en la pasintaj jaroj.

La lokaj ĵurnaloj tre atente sekvis la semajnfinan kunvenon per ĉiutaga publikigo. Radio WDR (Westdeutscher Rundfunk) disaŭdigis ĉi-okaze intervjuon kun la prezidantino. Generala tendenco: oni agnoskas kiel memkompreneble la fakton, ke la Internacia Lingvo estas necesa ilo por internacia kunlaboro. Konstateble montriĝas jam la fruktoj de ofta kaj insista informado; sekve la publicaj medioj raportadas objektivaj kaj pli faksparte pri Esperanto kaj ties praktikeco.

wbr

FFEA-jarkunveno 1987

Ankaŭ tiun jaron kelkaj membroj de GEFA sekvis la inviton de la Franca Fervoja Esperantista Asocio (FFEA) partopreni la jarkunvenon de la 24a ĝis la 28a de septembro 1987. La organizantoj estis elektintaj jaman barokstilan monaĥejon situantan en la montara regiono ĉirkaŭ Liono, kie kutime okazas internaciaj seminarioj.

La kunvenantoj staris sub la ŝoko de la ĵus mortinta FFEA-prezidanto G. Horn. Nome de GEFA s-ro H. Schindler esprimis la sinceran kondolencon pro la neatendita forpaso de tiu bonega prezidanto. Ankaŭ reprezentantoj de sindikato kaj kultura asocio salutis la ĉeestantojn. La nove elektita prezidanto Robiollé ilustris la ĝisnunajn preparojn por la 40a IFEF-kongreso okazonta 1988 en Perpignan.

Amika etoso regis. Komune oni manĝis, vizitis la proksiman monaĥejon konstruitan de la fama arkitekto Corbusier, ĝuis la kantojn de la liona fervoja ĥoro kaj la kanzonojn de Jacques Le Puil. Dum la tuttaga ekskurso la kongresanoj rondveturis tra la mirinda regiono de Beaujolais kaj provis la famajn vinojn. En la sunbriligitaj vitejoj ĵus komenciĝis la rikolto de vinberoj. Vizito al Liono kun sia grandioza baziliko finis kvar neforgeseblajn tagojn en Francio. Kun danko al la gemikoj oni revojaĝis. W. B.

Asperis la plej aktuala suplemento de „**Handbuch der internationalen Sprache Esperanto**“. En ĝi estas traktataj dek aktualaj kaj interesaj temoj el la internacia Esperanto-Movado. La suplemento prezentas faktojn pri la rilato inter scienco kaj Esperanto kaj Pacmovado, pri la rolo kaj evoluo de la fervoja Esperanto-Movado kaj pri historio de la Esperanto-Movado en Irano.

En alia teksto de la suplemento oni ricevas la necesan klarecon pri la ekesto kaj pri la estonteco de la „Akademio Internacia de la Sciencoj“ en San Marino kaj informojn pri la „Internacia Esperanto-Kursejo“ en Bulgario. Estas prezentata la Esperanto-klubo de Munkeno kaj superrigardo pri la germanlingvaj Esperanto-revuoj.

La kompleta verko „Handbuch der internationalen Sprache Esperanto“ estas redaktata de spertaj Esperantistoj en Berlino kaj kompletigas la prelegoserion

„Esperanto en la Praktiko“ kiu okazas ĉiun mardon en la kulturdomo „Villa Kreuzberg“.

La suplemento kostas 3 germanajn markojn kaj riceveblas kontraŭ sendo de poŝtmarkoj al la jena adreso:
Gesellschaft für internationale Verständigung
Körtestraße 34, D-1000 Berlin 61

Erfahrene Esperanto-Sprecher, u. a. Gernot Ritterspach, haben sich zur Mitarbeit bereitgefunden.

Andere haben Materialien zur Verfügung gestellt. Die Redaktion des Handbuchs dankt besonders Joachim Giessner und Josef Weidacher hierfür.
Siehe auch die Vorankündigung im Bulteno 3/87, Seite 9.

Esperanto - das Phänomen einer lebenden Plansprache

Unter diesem Thema lud die Gesellschaft für deutsche Sprache e.V., Zweig Frankfurt zu einem Vortrag am 11. Mai 1987 ins Haus Gallus (Frankenallee) in Frankfurt ein.

Referentin und kompetente Kennerin des Esperanto war Frau Dr. Phil. Alicja Sakaguchi, derzeit Lehrbeauftragte an der Universität Frankfurt. Dr. Sakaguchi bietet im Sommersemester 1987 u. a. ein Proseminar an, das theoretische und praktische Fertigkeiten in der Internationalen Sprache vermittelt.

Sie hat als Polin am Esperanto-Lehrstuhl in Budapest promoviert. Zusammen mit ihrem japanischen Ehemann erzieht sie ihr Kind in Esperanto als „Muttersprache“, sie berichtet also auch aufgrund von intensiven Erfahrungen im natürlichem Umgang mit der internationalen Sprache.

Bereits bei früheren Diskussionen um den Einsatz von Computern im Rahmen der Gesellschaft für deutsche Sprache tauchte das Stichwort Esperanto auf, zunächst als Hilfssprache zwischen zwei „natürlichen Sprachen“. In der Einladung zu dieser Veranstaltung wies nun die Gesellschaft darauf hin, daß Esperanto, vor genau hundert Jahren entwickelt, jedoch mehr will als nur eine Erleichterung maschineller Kommunikation zu sein.

An der Vorbereitung der Veranstaltung waren auch Mitglieder der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt beteiligt.

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo
Stato: januaro 1988**

Estraro

Prezidanto: BAR a. D. Giessner,
An der Nicolai-Schule 3, 3420 Herzberg
am Harz, tel. 0 55 21 / 45 86; EDS an
Bf 342 Herzberg (Harz)

Vicprezidanto/Redaktoro:
BAR a. D. Grass, Sachsenstraße 7,
8620 Lichtenfels, tel. 0 95 71 / 64 68
EDS: Ga 862 Lichtenfels, Abholfach

Sekretario: BHS Riehn, Bm 680 Mannheim,
Basa 953/899/1236 aŭ 536
Privata adreso: Richard-Dehmel-Str. 3,
8700 Ludwigshafen/Rhein,
tel. 06 21 / 58 24 43

Distriktaĵ komisiitoj:

Essen: BBI Rolf Terjung Bf 433 Mülheim/
Ruhr, Basa 944/818/366.
Privata adreso: Finkenschlag 68,
4100 Duisburg 26, tel. 02 03 / 72 40 95

Frankfurt/Main: BAR Kiefer, BSA 600
Frankfurt/Main, AA 341, Basa 955/5656
Privata adreso: Erthalstr. 6, 8770 Lohr/Main,
tel. 0 93 52 / 67 07

Hamburg: BHS Böhnke, Bf 240 Lübeck Hbf.
Basa 947/862/374

Hannover: BBI a. D. Heimlich,
Bf 304 Soltau/H., tel. 0 51 91 / 52 13

Karlsruhe: BOS Bernhard, Bf 680 Mann-
heim Rbf.

Köln: BAmtm a. D. E. Herlitze,
Prof. Neu-Allee 32, 5300 Bonn 3,
tel. 0 228 / 46 28 82,
EDS: Fka 530 Bonn Hbf

München: BHS Lenz,
800 GV München Nord, Basa 962/1528

Nürnberg: TBOAR Röder, BD 850 Nürnberg
B 8201, Basa 966 / 5671

Saarbrücken: BBI a. D. Hauptenthal,
BD 660 Saarbrücken, V 26
Privat: Brennender-Berg-Str. 28
6603 Sulzbach/Saar, tel. 0 68 97 / 38 56

Stuttgart: TBOAR Krüger,
BD 700 Stuttgart, MW 0013; Basa 952/3125

Specialaj komisiitoj

Kasisto: BOS Bernhard, Bf 680 Mannheim
Rbf.

Fakterminaro: LBI a.D. Dieter Hartig,
Bez. 280 Bremen
privata adreso. Kasseler Str. 76,
2800 Bremen 1, tel. 04 21 / 35 33 39

BOAR Ritterspach, ZA 650 Mainz,
Mk 1131, Basa 954/5533;

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:
BOAR a.D. Fritz Lautenbach,
Abstor 21, 6400 Fulda, tel. 0661/77627;
EDS: Esperanto-Gruppe, 640 Fulda

Bulteno-dissendo:

BOS a. D. Heinz Schindler,
Max-Klein-Straße 21, 5830 Schwelm,
tel. 0 23 36 / 1 56 54, EDS: Fka 583 Schwelm

Emerituloj:

BHS-in a. D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121
6000 Frankfurt/Main 70, tel. 0 69 / 65 73 65

Arkivo: BHS Riehn, Bm 680 Mannheim,
Basa 953/899/1236

Biblioteko kaj IFEF-kontaktadreso:

BAmtm a. D. Otto Rösemann, Ringstr. 14 D,
3067 Lindhorst, tel. 05725/7992,
EDS: Betr.St. Bf 306 Stadthagen

Gazet-kolektejo kaj -forluado: BAR Kiefer,
BSA 600 Frankfurt/Main, AA 341,
Basa 955/5656

Specialaj taskoj:

BOAR a. D. Barnickel, Betr.St. Fahrkarten-
kasse 600 Frankfurt/Main Süd
Privata adreso: Tiroler Str. 12 b
6000 Frankfurt/Main 70, tel. 069/632372

Peto al la eksterlandaj geamikoj!

Jen ni komunikas la aktualan adresaron
de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj.
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii
la akuratan akcepton.

Redaktfino por n-ro 2/88 estas la 25.3.1988.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung /
redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7, Druck / presio: Druckerei Friedrichs,
3420 Herzberg am Harz